

Leterkesto-2, Britio, Bulgario, Centra Afrika Respubliko, Ĉeĥoslovakio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 julio 21.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-19/SRI-1988-19-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-2-Britio-Bulgario-Centra-Afrika-Respubliko-Chehhoslovakio.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Nia leterkesto estas denove plen-plena. Tial alvenis la momento rebabili kun nia aŭskultantaro. Ni komencis la pasintan semajnon tiun babiladon kun niaj geaŭdantoj, salutante tiujn, kiuj sendis leterojn. Laŭ la alfabeto vico, jen ni alvenis al nia tre fidela aŭskultanto, Bruno NAJBARO,

A.- kiu interesiĝis pri la esperanto-pioniro Jean BOREL. Kiam ni raportis pri d-ro Ivo Lapenna, perturboj venis fuŝi niajn dirojn. Kontraŭe, s-ro Najbaro povis ĝui pri muzikaĵo el Hungario, kiun ni aŭdigis. Li faris pravan konstaton, aŭdante nian raporton pri la fruaj jaroj de la esperanto-movado en Svislando, ni citas lin: "Laŭ mi la enhavo sonas iom religiece. Tamen tiu religieco kaj idealismo donis persistemon al la pioniroj. Mi scivolas, ĉu oni tro emfazas la praktikecon hodiaŭ?"

Cl.- Bruno Najbaro loĝas en Keighley en Britio. Povas esti, ke nuntempe multaj esperantistoj iom tro silentas pri la filozofia aspekto de la poresperanta aktiveco, kaj ĉefe kiam ili propagandas, tro akcentas la servojn, kiujn la lingvo jam povas alporti. Persistas en la praktiko de esperanto fakte tiuj, kiuj estas pretaj ion donaci, ne nur ricevi. Jen tio, kion ni povas iom respondi al la sentoj de Bruno Najbaro, pri tiu religieco, kiu karakterizis la komencon de esperanto.

A.- Ĉiam en Britio ni salutu Henry D. PALMER en Milverton,

Cl.- Walter kaj Alice PEAKE en York, kiuj skibis, ke dum la edzo laboras, la edzino registras niajn elsendojn. Tiel Walter PEAKE povas aŭskulti niajn preiegojn revenante el la laboro,

A.- Ray PERSON en Didcot estas sesdek-jara progresanto, kiu komencis lerni esperanton antaŭ unu jaro. Li skribis: "Konsekvence mi ankoraŭ ne povas skribi flue la lingvon. Tamen mi tre ĝojas aŭskulti viajn programojn.",

Cl.- Stephen THOMPSON en BOLTON sendis kasedon kun dek ses kanzonoj.

A.- Alvenas la vico de Bulgario, kie BURGASA Rajono en Jambol iom konfuzas la vortojn sveda kaj svisa. La svisoj parolas plurajn lingvojn: la alemanan, francan, italan kaj ladinan aŭ romanĉan, sed ne la svedan, kiun oni praktikas en Svedio. Tiu konfuzo havas kaŭzon. La mallongigo por Svedio estas la litero S. Por Svislando la mallongigo estas la du literoj C kaj H, ĉar fakte ili estas la mallongigo de la vera nomo de la federacio, kiu en la latina lingvo estas Confederacio Helvetika.

Cl.- En Francio garaĝisto, kiu vendis al mi benzinon, informiĝis pri mia nacieco, ĉar sur mia aŭtomobilo estis la du literoj CH. Li kredis, ke la svisoj havis la literon S, kaj ke ili parolas la svisan. Mi klarigis al li, ke tiuj estas svedoj, kaj ke ili parolas svede, kaj ke la svisoj havas la

literojn CH, kiuj korespondas en la franca lingvo al la nomo Confédération helvétique. Alia franca garaĝisto foje informiĝis, por scii, ĉu la du literoj CH, kiuj formas en la franca la sonon S, estis elektitaj, ĉar oni diras SCHWEIZ. Li volis scii, ĉu ni diras Chuisse, en la franca lingvo, anstataŭ 'suisse'. Li miris, kiam ni klarigis al li, ke ne ekzistas svisa lingvo, ke la franclingvaj svisoj diras Suisse, kiel la francoj. Multaj identigas Ŝtaton kun nacio kaj lingvo. Svislando estas federacio de 26 ŝtatoj, kiujn la svisoj nomas kantonoj. Dum kelkaj kantonoj estas unulingvaj, kelkaj estas dulingvaj, kaj unu eĉ estas trilingva. Sed ni forlasu Svislandon por salti al Centrafrika Respubliko, kie ni havas fidelan aŭskultanton,

A.- Luc FEIDANGAI en Bangui, kiu skribis: "Karaj gesinjoroj Gacond, Viaj elsendoj estas momente la solaj, kiujn mi ĝue aŭskultas dufoje semajne. Vi ĉiam elektas bonajn temojn, tiel ke la elsendoj estas variaj, interesaj, informaj kaj instruaj. Elkore mi gratulas vin kaj deziras al vi longan vivon kaj plenan sukceson. Kore kaj samideane Luc FEIDANGAI el fora Afriko."

Cl.- En Ĉeĥoslovakio ni havas plurajn aŭskultantojn:

A.- Ni saiutu Karel KOPECKY en Trebechovice,

Cl.- František HAVLIK en Modonin, kiu skribis: "Via voĉo estas ĉiam bone audebla ĉe ni",

A.- A. KVASNA en Melnik, kiu skribis: "Dum mia 80-jara naskiĝtago mi povis ricevi vian elsendon kaj mi ĝojas, ke mi sukcesis",

Cl.- ĉiam en Ĉeĥoslovakio ni salutas Karel kaj Zdena KOPECKY en Trebechovice,

A.- Karel KRAFT en Borotice, kiu aŭskultis kun granda atento niajn nekrologajn elsendojn pri d-ro István Szerdahelyi,

Cl.- Jiri LAUBE en Roudnice, kiu opinias kiel ni, ke la evito de la nomo esperanto, profite al la mallongigo ILo, estas evitinda. Pluraj aŭskultantoj esprimis la samon, dum neniu apogis la ideon, ke oni devas ĉesi nomi la zamenhofan idiomon per la nomo esperanto, preferante la nomon Ilo. La nomo Ilo por anstataŭi la nomon Esperanto estas malbone elektita, ĉar ĝi vekas ĉe ĉiu esperanto-parolanto la impreson de io mekanika, pro la signifo mem de ilo, kiu signifas 'instrumento'.

A.- Jiri PATERA en Praha interese raportas pri la aŭskultado de niaj elsendoj kaj daŭrigas sian longan leteron per sciigoj pri la esperanto-vivo en Ĉeĥoslovakio. Ni citas lin: "En septembro okazis en la moravia urbo Olomouc 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en kiu estis elektita nova estraro de la Asocio. Nova prezidanto fariĝis inĝeniero Petr CHRDL (prononcu ĤRDLE) kaj ankaŭ mi fariĝis membro de la prezidantaro, ĉar mi funkcias kiel redaktoro de la asocia organo Starto. La kongreson partoprenis ankaŭ vicministro pri kulturo d-ro Josef ŠVAGERA, kio estis tute aparta fenomeno, ĉar ĝis nun neniam tia altrangulo oficiale salutis la esperanto-kongresojn en nia lando. Li esprimis sin pozitive pri nia movado kaj promesis ĉiaspecan helpon.

Cl.- Ĵiri PATERA daŭrigas sian raporton dirante, ke la ĉeĥa Esperanto-Asocio devas nun solvi multajn problemojn amasiĝintajn dum la pasintaj krizaj periodoj. Estas necese haltigi la

malkreskon de la membraro, eldonigi novajn lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj nun ege mankas, trovi novajn pli grandajn ejojn por la asocio, ĉar la ĝisnunaj en la Jilska-strato tute ne sufiĉas des pli, ke tie estas staplita ankaŭ la Praga Esperanto-Biblioteko, kiu dume tute ne funkcias.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la salutadon al niaj skribemaj geaŭdantoj, plucitante el tiu interesa letero de Jiri Patera.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi : Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*